**Programo de EDE        2011 01 06**

## Homaj Rajtoj

Nia tuta agado estas bazata sur la homaj rajtoj, kiel prezentitaj en la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj, kaj ni volas atingi la kompletan aplikon de la tuta deklaro en Eŭropo. Ni konsideras homajn rajtojn kiel kernon de la eŭropaj valoroj.

## * Eŭropo

- Ni estas por tio, ke oni rigardu la nunan mondan ekonomian krizon ne nur kiel problemon sed ankaŭ kiel eblecon. Estas necese evoluigi novajn modelojn, kiuj centriĝas ĉirkaŭ la protekto de homoj kaj ne de financaj aŭ industriaj instancoj. La nova liberalismo, kiu montriĝis malkapabla certigi stabilecon kaj dignan vivon por ĉiuj, devas esti korektata.

- Ni estas *por* tio, ke la eŭropa identeco ne estu konstruata per la detruo de la ekzistantaj identecoj sed per la libera aliĝo de la civitanoj al plia identeco.

- Ni estas *por* daŭra konstruado de forta eŭropa politika unuiĝo, kiu okazu samtempe kun la plibonigo de la viv-kondiĉoj de la europaj civitanoj.

- Ni estas por tio, ke la produkto- kaj vivo-sistemoj en europaj landoj estu kiom eble plej respektaj al la natura medio tiel, ke normala vivo en Eŭropo estos ebla ankaŭ por la venontaj generacioj.

## * Demokrateco

- Ni estas *por* demokrata konstruo de Eŭropo, kies baza leĝo estu submetata al referendumo de ĉiuj eŭropaj civitanoj. Same pri aliaj decidoj de tuteŭropa graveco referendumoj devas iĝi pli kutimaj, por reaserti la fakton, ke en demokrataj landoj la popolo decidas.

- Demokrateco antaŭpostulas liberan amas-komunikadon sendependan de politikaj kaj industriaj grupoj. Ni estas *por* ke Eŭropo subtenu la ekziston de liberaj amaskomunikiloj.

- Ni estas *por* rigora apliko de la principo de malcentra decidado kaj ni taksas demokratecon ne sufiĉa en Eŭropa Unio.

## * Esperanto kaj lingvaj rajtoj

- Ni estas *por* la agnosko de la homaj lingvaj rajtoj de ĉiuj eŭropaj civitanoj tiel kiel difinas ilin pluraj dokumentoj de Unesko, alivorte ni estas *por* la uzo, ĝis la plej alta grado ebla, de ĉiuj lingvoj parolataj en la Unio. Kiam ne eblas uzi la gepatran lingvon, ni estas *por* la uzo de la internacia lingvo Esperanto, kio garantias lingvajn rajtojn je internacia nivelo.

- Lingvaj rajtoj devas esti agnoskataj al ĉiuj historiaj malplimultoj kaj al ĉiuj novaj malplimultoj en Eŭropo. Ni estas *por* politiko de integrado de ĉiuj novaj kaj malnovaj loĝantoj de Eŭropo, en la kadro de plurismaj socioj sed samtempe en la respekto de la

homaj rajtoj de ĉiuj individuoj. Esence ni proponas median protektadon ankaŭ rilate al kulturo, kio inkluzivas protektadon de lingva diverseco, simile al protektado de la natur-diverseco. La internacia lingvo Esperanto ĝuste utilas por tiu celo.

- Ni estas *kontraŭ* tia ŝajna plurlingveco, kia ĝi estas praktikata nuntempe de la instancoj de la EU, ĉar ĝi praktike starigas unulingvecon per la angla kontraŭ ĉiuj eŭropaj internaciaj interkonsentoj. En tiu situacio, ĉiuj landoj, kies gepatra lingvo ne estas la angla, pagas lingvan imposton, kies avantaĝoj iras nur al kelkaj landoj kaj sociaj tavoloj. En situacio de ĝenerala instruado de Esperanto la lernejaj sistemoj ŝparus grandegajn sumojn. La politiko de instruado de fremdaj lingvoj en la lernejoj de Eŭropo devas esti agordata al la bezono efektive instrui ankaŭ la lingvojn de la najbaraj popoloj.